Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI – 10-a de Februaro 2020

Ĉeestantoj: Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Jehoŝua Tilleman, Eran Yuval-Vodevoz. **Gastoj**: Amos Ŝapira.

Protokolo *de la pasinta kunsido en la retejo:*
http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP202001.pdf

1. Demisio de Asaf Ĥefec el la Estraro

Laŭ sia propra ideo esprimita dum la januara kunsido, Jehoŝua proponis al Asaf demisii el la Estraro kaj enposteniĝi kiel la dua membro en la Kontrol-komisiono – kion tiu ĝoje akceptis. Intertempe Asaf jam sendis sian oficialan demisi-leteron al la Estraro.

2. La 21-a Israela Kongreso

Amri raportas telefone, ke ĝis nun estas 70(!) aliĝintoj – el ili 25 eksterlandanoj, kaj ne plu sufiĉas ĉambroj en "Bnej-Dan". Pro tio la gastejo postulis, ke la israelaj tranoktontoj tuj pripagu siajn ĉambrojn.

3. Dratverejo

Post la letero ricevita pasintmonate el la Ekzekucia Instanco **Ŝlomo** eksciis, ke la evikcia procezo povas esti remalfermita. Amos Ŝapira transdonas al Ŝlomo 3,000 siklojn, kiujn li ricevis de la luanto Dima Nemirovski. Denove ekestas la demando, ĉu daŭrigi la evikciiadon – per **voĉdono** estas decidite, ke Ŝlomo atendu dum la luanto pagadas. Intertempe Ŝlomo asekuru la loĝejon laŭ la plej bona inter tri ricevotaj asekur-ofertoj.

4. *Israela Esperantisto*

Mikaelo proponas, ke kun la venonta numero (170) de IE estu sendita enketo pri eventuala ricevo de papera aŭ elektronika versio de la Revuo. **Voĉdono**: unuanime akceptita.

La venonta kunsido: 9-a de Marto 2020, 19:30

Protokolis: Mikaelo Lineckij